

Ŝulco Rikardo

* 1906-07-12 † 1997-10-26

(Fotaĵa originalo kaj diĝita variaĵo fare de Rita Rössler-Buckel)

Rikardo Ŝulco, la pentristo kaj grafikisto

Rita RÖSSLER-BUCKEL

Enkonduko

Kiu iam rigardis, atente trafoliumis la librojn de Rikardo Ŝulco, povis konstati, ke tiu gramatikisto, lingvofilozofo kaj beletra aŭtoro havis ne nur fortan inklinon al la pentra kaj grafika artoj, sed ankaŭ mem disponis pri certa talento en tiuj ĉi kampoj. Ja ekzistas multaj senbildaj publikigaĵoj liaj, ekzemple la klasikaj “Pledo por unueca lingvo” kaj “Sur la vojoj de la Analiza Skolo”, sed plurajn li ornamis per propraj aŭ fremdaj grafikaĵoj, malpli ofte per pentraĵoj aŭ medaloj.

En tiuj libroj oni forte sentas lian bezonon de kompleteco en la arta kampo. Li ŝatis kunligi ĉion, kio estas ebla inter du kovriloj: teksto en originala lingvo + traduko en alian + ilustraĵoj + fotoj + foje eĉ muziknotoj. Por li la mondo estis bunta, varia, ĉion inkludanta, kaj li elektis por si kaj liveris al la publiko la por la temo plej ampleksan kadron. Li vere estis artisto, certe plej profesiece en la lingvoj, sed almenaŭ amatore en la bilda arto. Kompare kun desegnaĵoj de Ĵano Lajpo, kiujn li iam sonete komentis, liaj “agregaĵoj” ne aspektas malpli kvalitaj laŭ inventemo, teĥniko kaj arta sento. Kaj li nomas tian konatan teksto-aŭtoron unualoke “grafikisto, pentristo”, antaŭ “verkisto kaj poeto.”

En pli fruaj jaroj, en la Franclingva poema memportreto “*Les dadas du vieux retraité*” (“La ŝatokupoj de la maljuna retiriĝinto”, 1969) li ankoraŭ bedaŭras, ke la naturo ne pli bone dotis lin, kaj bone observante la verajn pentristojn (“*J’entends des peintres le concert*”) li konstatas, ke li mem kapablas pentri nur naive (“*Je fais naïvement peinture*”). Tamen insiste li ripetas poemofine: “*J’exécute au pastel peinture*” (“Mi pentras laŭ paŝtela teĥniko”).

Pli poste li sentis sin serioza verkisto sur papero kaj tolo. Tion pravas la ne malofta memtaksado kiel – almenaŭ – grafikisto. En “La

muzino“ li kvalifikas sin “Rikardo Ŝulco en ties propreco kiel pentristo kaj poeto.“ Pri sia poeteco li neniam lasis dubojn, do ni ankaŭ ne dubu pri lia pentristeco. Ĉar liaj bildaj postlasaĵoj aperis dise en diversaj publikigaĵoj, kaj ĉar li menciis ilin ofte nur en antaŭvortoj nelegataj/neglektataj, mi provas iom kolekti, kion koncernas tiun ĉi Ŝulcan vivosferon.


Unue mi prezentu lian aliron al bildoj de aliuloj, kiuj rolas en liaj libroj. Poste mi montros la Ŝulcajn propramanajn ilustraĵojn. Finu la mencio de liaj vortaj kontaktoj al bildoj.

1. “*Abyssos / Abismo*“

En “*Abyssos / Abismo*“ Rikardo Ŝulco komentas grafikaĵojn de Ĵano Lajpo per propraj sonetoj Esperantaj kaj Germanlingvaj. Do tiukaze li mem ne desegnis, sed intue reagis poezie al bildoj. Logis lin, krom la personaj rilatoj al la desegnisto, la fantazia, inkuba aŭ kurioza enhavo de la detala skizoj, vizioj foje torturantaj, foje burleskaj dum veneniĝo de Ĵano Lajpo, sojle de lia senkonsciigo. En abunda “Enkonduko“ Ŝulco pravas sian intereson kaj kompetentecon rilate grafikajn teknikojn kaj volonte citas klarigojn de fakuloj kaj de Lajpo mem. La malantaŭa kovrilopaĝo prezentas portreton de Rikardo Ŝulco, kreita por medalo de la filmoarĥitekto, artoedukisto, pentristo kaj grafikisto Ernesto Ŝomero (*Ernst Schomer / Minden*). Sur la antaŭan kovrilpaĝon Ŝulco metigis fajnan portreton de Ĵano Lajpo, fare de la Sviso *Willy Buck*.

2. “*Sur la vojoj de la Analiza Skolo*“

La Esperantologian esearon “*Sur la vojoj de la Analiza Skolo*“ titolpaĝe kaj dorsflanke akompanas la du surfacoj de medalo pri L. L. Zamenhofo. Tre konscie Rikardo Ŝulco estis elektinta kaj komentinta ĝin. En la dediĉa paĝo li komunikas: “Mi dediĉas tiun ĉi libron al la skulptisto *Josef Goslawski*, kies nomo staras sur la medalo, kies fronto kaj dorso ornamas la unuan kaj kvaran paĝojn de la librokovrilo. Ĝi estas kreita en Varsovio kaj rememoras alian jarcentigon ol estas la nuna jaro 1987, nome tiun de la naskiĝjaro de la “majstro”: MCMLIX, t. e. 1959. Sube estas prezentita la Varsovia blazono kun fiŝvosta marvirineto armita per glavo kaj ŝildo.“ Tiel li rigardis kaj pripensis bildojn, ĉu aliulajn, ĉu proprajn.



Rikardo Ŝulco laŭ medalo de *Ernst Schomer*

3. “*La trombonoj de Jeriko*“ / “*Die Posaunen von Jericho*“

La Ŝulca parafrazo de la unuaj ses ĉapitroj de la Biblia libro pri Josuo “*Die Posaunen von Jericho*“ / “*La trombonoj de Jeriko*“ (en trokeo-kvaroj Esperante kaj en la Germana lingvo) titolpaĝe montras portreton de Josuo. Ene, iom aldone, akompanas vinjetoj de la sama Ernesto Ŝomero la rakonton. En tiu libro la desegnaĵoj ne estas tiom gravaj. Sed aparta trajto estas la eblo kanti la versojn de la teksto laŭ ĉiam samaj ritmoj kaj melodioj. La muzikan parton plenumis la Hamburga komponistino Felicitino Kukuko (*Felicitas Kukuck*) por dancigi poloneze grandajn grupojn de muzikamatoroj.

4. “*Amuza legado pri Til’ Strigospegul’*“

Transiron al propraj bildoj prezentas la Ŝulca majstra traduko de “*Till Eulenspiegel*“ / “*Amuza legado pri Til’ Strigospegul’*“. La tekston akompanas ĉiuj okdek sep lignogravuroj de la fruaj Strasburgaj eldonoj. Sed la titolbildo estas pure Ŝulca. Recenzisto iam rimarkigis: “Li jam mokrigarde prezentas sin kovrile al la leganto, la ŝnurdanc-

isto, burleskulo, friponego, la mondvaste fama protagonisto kaj titoldoninto de la libro. La tradukinto pentris ties fantaziportreton. “Ĉu vere tiu iom timiga kovrilpaĝa ulo jam en la kreojaro 1972 ludis la rolon de Til’, ne koncernu nin. Se ni kredas, tiam li kun sia oblikva rigardado, siaj grandaj oreloj, sia fremdkolora haŭto vere estas la Strigospegulo de la tradukoeldono en 1987“. Kaj ni volonte kredas.

5. “La muzino“

La libron “La muzino“ uverturas alia portreto. Deveninte el la jaro 1964, ĝi montras la duan edzinon kaj muzinon Ilzino. En sia “Antaŭparolo“ kaj en informa teksto de la eldonejo, Rikardo Ŝulco sobre ankaŭ per vortoj pentras ŝian personecon, kvankam almenaŭ tiam kaŝante ŝian veran identecon:

“La 520 paĝoj troviĝas sub viola kovrilo, kies unua paĝo montras paŝtelon desegnitajn de la aŭtoro mem. La desegnaĵo valoras la penon esti rigardata iom atente. Neniu dubo pri tio, la Muzino "paŝtelo" kaj la Muzino "libro", laŭ la intenco de la verkisto, estas identaj. Tiu ĉi virino certe ne estas beleculino. Ŝi estas nek dolĉe afekta, nek sentimentalita. La ŝvebanta sentorsa kapo estas kvazaŭ simbolo de spirito forigita el la Tera gravito. La viola koloro substrekas tion. Jen matura virino, kies okuloj rigardas malproksimen trans forajn horizontojn. La agrabla ovala vizaĝo, la impete karakteraj kaj elane svingiĝanta nazo, la abunde voluptaj lipoj signas virinon vivospertan inter la statoj de adiaŭanta amatino kaj matroneca patrino. La afabla leganto faros bone, de tempo al tempo meditante rigardi tiun ĉi paŝtelon. La malkutima vortoformo 'muzino' anstataŭ la ordinara 'muzo' montras la strebadon de la verkisto, akcenti la fortan inecon de la inspirantino. Estas, kvazaŭ temus pri kontraŭe, tamen analoge formita vortoparo kiel 'fraŭlo' kaj 'fraŭlino'.”

Pliajn pentraĵojn la libro ne enhavas. Dorsflanke de la libro, Ŝulco plifortigas la duan rolon de la antaŭparole ambigue karakterizita “adiaŭanta amatino kaj matroneca patrino“ kaj paroligas sian nun plene patrinecan muzinon:

Ne ofte okazas,
ke muzino parolas.
Tiu ĉi tamen iam diris:
“Por ke ci estu poeto,
kara filo mia,

ĉiam sciu,
kio koncernas cin!
Dum cia sur-Tera migrado
rigardu supren al la steloj kaj
ĉiam interligu cian vivon
al tio, kio estas Dia!“

Cetere, nur tre malofte, ekzemple foje en “Til’ Strigospegul’“, Ŝulco utiligis la en Esperanto tre intiman personan pronomon “ci“. Sed, kiel konate, inter muzino kaj ŝia adepto efikas tre apartaj rilatoj.



Ilzino Ŝulco kaj la aŭtorino (Aalen, 1991)


6. “La sonoreco en poezio kiel traduka problemoj“

Pliajn pentraĵojn la libro ne enhavas. Sed ĝi enhavas kelkajn malmultajn, tre informajn desegnaj ilustrojn. En la artikolo “La sonoreco en poezio kiel traduka problemoj“ la aŭtoro komunikas siajn ekonojn pri literaturaj formoj kaj deklamado en desegna realigado. La eleganta manskribo ne nur priskribas, sed ankaŭ analize bildigas la “muzikajn“ strukturojn de la poemoj. Tiel la desegnaĵoj aspektas kvazaŭ ĥoreografiaĵoj ne nur de la spirita enhavo, sed precipe de la parola ritmo kaj de la lingva melodio. Tiaĵon oni praktikis jam en la

tempo de la Gregoria ĉanto, kiam oni ankoraŭ ne konis muziknotojn. La ĥorestroj desegnis la melodiojn laŭ ilia moviĝo mane aeren, kaj en la skribejoj la skribistoj desegnis ilin paperen. El tiuj ĉi “*neŭmata*“ (t.e. “signoj“ laŭ la Greka lingvo) fine estiĝis la mezepokaj kvadrataj muziknotoj kaj poste nia jam kutima muzikskribo.

7. “Pendumilaj lidoj“ / “Palmŝtrojmo“

Eble tial, ke la versoj de Kristiano Morgenŝterno jam mem provokas elokventajn bildojn, Ŝulco ornamis siajn du libroformajn tradukaĵojn tre modere. En la unua, “Pendumilaj lidoj“, li kvalifikas siajn aldoniĵojn “spiralajoj, desegnaĵoj kaj vinjetoj“; la duan, “Palmŝtrojmo“, li provizis nur per manskribaĵoj por aparte indiki ĉapitrojn.



8. “333 limerikoj“

La Eldonejo Blajĥero (*Bleicher*), apud la plej disvastigitaj libroj de Ŝulco eldonis ankaŭ kuriozaĵon, nome model- kaj lernolibron por la produktado de limerikoj en la Germana lingvo: “*ne ältere Dame aus Preetz*“ (“Dam’ maljuneta el Preco“). Ambicie Ŝulco mem kontribuis per 333 limerikoj (plej ofte en la Germana lingvo kaj ties dialektoj, sed ankaŭ en la Franca, la Angla kaj en Esperanto) kaj titolpaĝe fieras “*Mit vielen Zeichnungen des Verfassers*“ / “Kun multaj desegnaĵoj de la aŭtoro“.

Kiel la tekstoj estas ĝenerale ironiaj, satiraj, ankaŭ la desegnaĵoj estas tiaj. Plej impresa estas la komenca memkarikaturato, sufiĉe vivo-

vera, sed ankaŭ kelkaj eĉ priartaj, ekzemple tiu pri *Picasso*. En ties teksto li ruze komencas per la mencio de la dramo “Tasso“ de Fongojto (*J.W. von Goethe*). Post tiu ĉi jam pinta enkonduko la nivelo nur povas sinki. Kaj Ŝulco kun plezuro sinkigas ĝin. Tial iu devis skribi ian “Hasso“, kaj tuj ni ne plu vidas noblan palacon, sed nur etan laŭbon, kiun – fi! – makulis kolombo. La fina kulmino senmaskigas la pentristan grandulon. La mondkonata Pikasa kolombo laŭ Ŝulco nur estas – farbmakulo. Ĉu li ne bone observis la trukojn de la pentraj majstroj, la sentruka majstro de la lingvo kaj de la tranĉa lango?

109. Von Goethe, das weiß man, stammt „Tasso“,
und irgendwer schrieb einen „Hasso“.
Und den Klecks auf der Laube?
Ja, den kleckste die Taube. —
Die Taube, die kleckste Picasso.



(iela translingvigo: De Volfgang’ Fongojto estas la „Tasso“
kaj de iu alia estas la „Hasso“.
La surlaŭba makulaĉo
estas birda fekaĵaĉo. —
La kolombon, ĝin makulaĉis Picasso.)

9. “Agregaĵoj“

Tri librojn Ŝulco provizis per tre personaj bildaj inventoj. La bildoj, jam desegnitaj en la sepdekaj jaroj, ne rilatas al la tekstoj el la pli posta Esperanta fazo. Antaŭvorte en “Vespero jam fariĝis“ la aŭtoro klarigas:

“Ne estas alia rilato inter la desegnaĵoj kaj la versoj ol tiu, ke ilin ambaŭ faris mi. Ili ilustras (iamajn) animstatojn de ilia kreanto.“ Tio indikas, ke la bildoj – entute multaj (ĉirkaŭ 175!) kaj kompleksaj (foje pli ol 40 kapoj / figuroj!) – estis gravaj por li, tiom, ke ili simple ornamu liajn malfruajn librojn, por ke ili almenaŭ iel aperu publike.

Ili tre dense ligas kapojn kaj malgrandajn figurojn, korpopartojn, bestojn, pejzaĝerojn ktp. kvazaŭ kungluaĵon en tutaĵon. Ne malofte oni ekkonas la trajtojn de publike konataj personoj, iamaj kaj tiu-

tempe aktualaj. La bildoj ŝajnas esti ne karikaturoj, sed timigaj vizioj, ĥimeraj simboloj pri nia nekomprenebla tempo. Kiam Ŝulco ankoraŭ ne estis Esperantisto, li eldonigis ĉe Blajĥero 12 tiajn tuĉodesegnaĵojn sub la titolo “*Kosmogenetische Aggregate*“. En tiuj ĉi tri Esperantaj libroj – la du aliaj estas “La mago“ kaj “La viro en la luno“ – li nomas ilin “agregaĵoj“.

Kvankam neniuj agregaĵoj troviĝas en la libro “La muzino“, tie en poemo (paĝoj 402-404) la desegnisto priskribas iun el la desegnaĵoj Germanalingve kaj Esperante:

“Kosmogenezaj agregaĵoj“ (1991)

La plumo glitas sur la papero. Estas, kvazaŭ tirus ĝin la mano. La linioj kurbiĝas kaj fluas plu, kaj jam estiĝas okuloj, nazo kaj lipoj: vizaĝo.




el: “*ne ältere Dame aus Preetz*“ (“Dam’ maljuneta el Preetz“)

Jen neniuj haltoj. Dua, tria, kvara kaj ankoraŭ denove mentono kaj buŝo kaj, burleske, lipharoj, nudaj mamoj, brusto, ĉapelo, haĉita, ĉirkaŭe korpopartoj, brakoj, gamboj, kaj ĉio pendas de ĉio. Ĉiu ajn estas monado, estas por si mem kaj rigardas – ne scias oni, kiel – en iun ajn malproksimecon, fremde kaj netuŝite. Birdo Fenikso disetendas sian plumaron, kaj senvivaj pendas ĝiaj ungegoj. La okulvitroj efikas kiel inertaj. La okulo rigardas kiel senbrila. Kalvulo, forkrevinta, ŝve-

bas kiel malstreĉita. Tre rifuzanta, serioza. Kiun do interesas kio? Estas agregaĵo. Kaj staturece firma kaj malplena la rigardo de la profilo tute maldekstre.“ Kopion de la bildo kune kun la priskriba teksto (en la originalo ambaŭlingve skribita kvazaŭ poemo) Rikardo Ŝulco donacis al *Karl Heinz Schaeffer* okaze de la unuafoja prezentado de “Banalaj historioj“ en Aleno (1991-04-07), “evidente emociiĝinte pro la digna libropremiero tie“.

Estas interese por nia temo, ke Rikardo Ŝulco nerare citas karakterajn bildojn kaj bildelementojn ne nur el la pasinteco (de la klasika antikveco ĝis la deknaŭa jarcento), sed ankaŭ de famaj samtempuloj kiel *Picasso*, *Dalí*, *Antes*, memkompreneble kun ties ie kaŝitaj portretoj. Aparte ofte aperas Pikasaĵoj, eble pro ties tiama dominanta ĉeesto en la publika konscio. Ŝulco mem posedis librojn kun bildoj faritaj de Pikaso. Aparte specimenoj el 1968 povas esti influintaj la desegnan stilon de la Germano:



Desegnaĵo de *Pablo Picasso*

La supozeble modeleman inklinon al la famulo eble provokis la “oblikva“ bildkoncepto de *Picasso*, kiu ne estis tiu de Ŝulco. Per ĝi li povis ironie denunci la modernan vivon. Samakadre oni povas konsi-

deri la Ŝulcan pri Pikasan desegnaĵon laŭ fotoĵo ofte publikigitan: jen citaĵe la koketanta artisto bankalsone ĉestrando.


Certe tiel oni povas kompreni ankaŭ la citadon de la fama vizaĝo el la bildo “La krio” de la Norvego *Edvard Munch* aŭ la vizaĝon de la same fama surealisto *Salvatore Dalí*.

En tiuj jaroj Ŝulco multe okupiĝis pri *Horst Antes*, kio kulminis en la bildlibreto “*Aus des Kopffüßlers Reich*” (vd. poste). Ankaŭ en la agregaĵoj aperas nemalofte aludoj al *Antes*.

Kvankam la libro “La mago” enhavas 49 nigrablankajn agregaĵojn, la titolpaĝo invitas tute aliamaniere: ĝi imponas per oranĝokolora paŝtela “mago”, tamen el la Ŝulca ateliero. Eble la majstro de la vorto estus ŝatinta vidi sin tiom magia, kiom li pentris tiun ĉi aplomban magiulon. Neniu malafablulo estus atakanta lin tiuĉitempe. Ne per vortoj, kaj tute ne per bildoj...


10. “Kappieduloj”

Laste estu menciata la plej frua libreto el la jaro 1972, “*Aus des Kopffüßlers Reich*” (“El la kappiedula regno”), en kiu Rikardo Ŝulco amuze, iom ironie, transpreneme atakas la “kappiedulojn” de la Germana pentristo *Horst Antes*, kies bildojn li frekventis dum ekspoziciado en *Bremen*. En tiu ĉi eldonaĵo, pure bilda krom antaŭvorto, titoloj kaj biografieto, li ankoraŭ uzas la pseŭdonomon “*Franziskus im Schnoor*”, formitan laŭ liaj tiamaj vivokoncepco kaj loĝkvartalo. La fantaziaj titoloj eble indikas, ke Ŝulco konis la verkon de la simile intelekta pentristo *Paul Klee* kaj liajn poeziecajn bildotitolojn (ekz. “Kappiedulo kun morta kaj viva enhavaĵo”; “Morgaŭ frue la kamenpurigisto” k.a.



Titolpaĝo de “El la kappiedula regno”

Per tiuj 25 bildoj Ŝulco atingis ankaŭ muzean honoron. Dorsflanke de la kajero “*Aus des Kopffüßlers Reich*” (*Fünfundzwanzig Antes-Karikaturen von Franziskus im Schnoor*) / Verlag H. M. Hauschild GmbH, Bremen, 1972, troviĝas la indiko, kiu posedas la originalojn (i. a. *Kunstverein Bremen* kaj *Wilhelm-Busch-Museum Hannover*).




La granda *Antes*-bestejo (*Das große Antes-Bestiarium*) el: “*Aus des Kopffüßlers Reich* / El la kappiedula regno”.

Pribildaj tekstoj

Post la bildoj en liaj libroj, mi nur aludu lian arthistorian erudicion, diversaloke literature elsparkantan. Temas pri tekstoj pri bildoj, bild-faraj teknikoj, pentristoj, pri artikoloj, recenzoj, antaŭvortoj, paroladoj ktp.


Ekzemple en la postparolo al la *Antes*-karikaturaj li rakontas pri la fruaj kaj aktualaj preferoj je artistoj kaj stiloj, pruvante sin ne nur ŝatanto, sed intima konanto.




“Francisko en la ekspozicio“ aludas internan/eksteran transformiĝon dum la vizitado de ekspozicio kun bildoj de *Horst Antes*




ilustras (iamajn) animstatojn



“Desegnaĵoj kaj versoj




de ilia kreado...“



Ekspozician enkondukon li prezentis pri *Ernst Schomer*, jam menciita pro priŜulca medalo. La teksto aperis en 1989 kajere en *Minde*. En recenzoj Ŝulco ofte simpatie pritraktis la ilustraĵojn de la libro, ekzemple ankaŭ la miajn en “Bestareto” kaj “Momentoj el eterno”.

Fino

Por fini, mi elektu bildon pentritan de Rikardo Ŝulco, kiun ne multaj Esperantistoj vidis, eble jam malaperintan postmorte: Portreto, pendinta ĉe li hejme, montras la scienciston teologon *Teilhard de Chardin*. Ĝi aludas la vivokoncepton de ambaŭ: ili taksis tiun ĉi surTeran vivon nur transira. Kiel skribis jam la apostolo: “Tie ĉi ni



nur vidas kvazaŭ tra spegulo, sed tie ni vidos de vizaĝo al vizaĝo.“ Eble Rikardo Ŝulco konsciis, ke dumvive ja la racia rezonado validas, sed postvive la senpera vidado elmontriĝos la kvinteseneco de la vivo.

Apendico

Ŝulca memportreto (maldekstre)

Foje Rikardo Ŝulco desegnis / pentris sin mem. La desegnaĵoj aspektas pli vivoveraj ol la sola postrestinta pentraĵo.

Adreso de la aŭtorino

Rita RÖSSLER-BUCKEL
Am Mönchsbusch 6
DE – 67373 Dudenhofen / Germanio

Priaŭtora informo

Muzikinstruistino, docentino,
pentristino, Esperantistino
<rozsas@web.de>

Publikigaĵoj de ŜULCO Rikardo

– libroj, kajeroj, flugfolioj – *

Hermann BEHRMANN

Aus des Kopffüßlers Reich (25 Antes-Karikaturen von Franziskus im Schnoor), Verlag H.M. Hauschild GmbH, Bremen, 1972, 34 p.

Mein geliebtes Esperanto / Mia amata Esperanto (4-a eldono), Eldonejo Bleicher, 1989, 244 paĝoj. (1-a eld.: 1976, 2-a eld.: 1978, 3-a eld.: 1984)

'ne ŭltere Dame aus Preetz (333 Limericks), Eld. Bleicher, 1977, 108 p.

Europäische Hochsprache oder Sprachimperialismus, Eld. Bleicher, 1979, 256 p.

La perdita honoro de iu Katarino Blum' (Heinrich Böll / traduko), Eld. Bleicher, 1978, 154 p.

Europa und Esperanto (prelego), Eld. Bleicher, 1980, 11 p.

Pendumilaj lidoj (Morgensterno Kristjano / traduko), Eld. Bleicher, 1980, 108 p.

Palmŝtrojmo (Morgensterno Kristjano / traduko), Esperanto-Centro Paderborn, 1983, 182 p.

La trombonoj de Jeriko / Die Posaunen von Jericho (dulingva eldono), Esperanto-Centro Paderborn, 1984, 68 p.

Vespero jam farigis (agregaĵoj kaj robajoj), Esperanto-Centro Paderborn, 1985, 128 p.

Pledo por unueca lingvo (Esperantologiaj eseoj kaj artikoloj), Esperanto-Centro Paderborn, 1985, 287 p.

Was nun Esperanto betrifft... (Festschrift zum 80. Geburtstag), Eld. Bleicher, 1986, 245p.

Amuza Legado pri Til' Strigospegul' (Boto Hermano / traduko), Esperanto-Centro Paderborn, 1987, 376 p.

Sur la vojoj de la Analiza skolo (Esperantologia esearo), Esperanto-Centro Paderborn, 1987, 279 p.

* Ĉiuj Ŝulcaj libroj (se ne elĉerpitaj) estas mendeblaj ĉe Libro-Servo *L.F.v.Wunsch-Rolshoven*, EsperantoLand e.V., Wicelstr. 9, DE – 10551 Berlin / Germanio
Tel. +49 - 30 - 6 85 58 31, Telekopiilo +49 - 30 - 68 05 70 11